WIKIPEDIA

Fulana lingvo

La **fulana lingvo** (ankaŭ kelkfoje **fulba lingvo**[1]) estas lingvo de Okcidenta Afriko, parolata de la fulanoj en Gambio kaj Gvineo, de la fulanoj en Kameruno kaj en Sudano. Ĝi estas parolata ankaŭ kiel unua lingvo de la tukuloroj en la valo de la rivero Senegalo kaj kiel dua lingvo de popoloj en aliaj areoj.

fula	
Fulfulde	
Parolata en	Niĝerio, Gvineo, Senegalo, Malio, Niĝero, Kameruno, Burkino, ...
Parolantoj	22 331 400
Denaskaj parolantoj	22 milionoj
Skribo	Latina alfabeto
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ff
ISO 639-2	ff
ISO 639-3	ful
SIL	FF (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=ff)
Glottolog	fula1264
Angla nomo	Fula
Franca nomo	peul
Vikipedio	

Enhavo

Klasifiko

Priskribo
- Morfologio
- Klasoj de substantivoj
- Voĉoj
- Ŝanĝo de konsonantoj
- Pronomoj

Dialektoj
- Orientocentra
- Orienta
  - Fulfulde, Adamava, fub
  - Fulfulde, Bagirmi, fui
- Okcidentocentra
  - Fulfulde, Maasina, ffm
  - Fulfulde, Borgu, fub
  - Pular
- Okcidenta
  - Pulaar

Skribado
- Latina alfabeto
  - fulana alfabeto
- Araba skribado

Bibliografio

Notoj kaj referencoj

Eksteraj ligiloj

Klasifiko

Kelkaj afrikaj lingvoj i.a. la **fulana**.

La fulana apartenas al la atlantika branĉo de la niĝerkonga lingvaro.

Priskribo

La fulana havas reputacion esti komplika, sed vere ĝi estas sufiĉe regula (malmultaj esceptoj aŭ "malregulaj" formoj).

Morfologio

La fulana estas bazita sur verbo-substantivaj radikoj, el kiuj devenas verbaj, substantivaj kaj modifigaj vortoj. Ĝi uzas ankaŭ Infiksojn (silabo enmetita meze de vorto, fakte post la radiko kaj antaŭ la finaĵo) por modifi la signifon.

Klasoj de substantivoj

Estas ĉirkaŭ 25 klasoj de substantivoj (ties nombro povas varii iomete laŭ diferencaj dialektoj).

Voĉoj

La verboj en la fulana estas kutime klasitaj laŭ 3 "voĉoj" (escepte en Adamava Fulfulde): aktive, meza kaj pasiva. Ne ĉiu radiko povas esti uzata en ĉiu voĉo. Kelkaj verboj de meza voĉo estas Refleksivoj.

Komuna ekzemplo de tiuj verboj el la radiko *loot-* (lav-) estas jenaj:

- *lootude* - lavi (ion)
- *lootaade* - lavi (sin)
- *looteede* - esti lavita

Ŝanĝo de konsonantoj

Alia eco de tiu ĉi lingvo estas la ŝanĝo de komenca konsonanto inter la formoj de singularo kaj pluralo de substantivoj kaj verboj (escepte en Pular, kie ne estas ŝanĝo en konsonantoj en verboj, nur en substantivoj).

Simpligita skemo estus jene:

- b <-> mb <-> w
- c <-> s
- d <-> nd <-> r
- g <-> ng <-> w
- h <-> k
- j <-> nj <-> y

Pronomoj

La fulana havas inkludantajn kaj ekskludantaj pronomojn de la unua persono.

Dialektoj

Kvankam estas multnombraj dialektoj de la fulana lingvo, ĝi estas kutime konsiderata kiel ununura lingvo. Wilson (1989) asertas, ke "longdistancaj veturantoj neniam trovas komunikadon malebla," kaj Ka (1991) konkludas, ke spite la geografian amplekson kaj la dialektan variadon, Fulfulde estas ĉefe kaj fundamente unu lingvo.[2] Tamen, tradukistoj de la Biblio supozas, ke almenaŭ oni bezonas 7 diferencajn tradukojn por fari ĝin komprenebla por ĉiuj parolantoj de la fulana, kaj etnologoj konsideras kelkajn el la variantoj kiel separatajn lingvojn:

Orientocentra

Fulfulde, Orienta Niĝero (Niĝero)

Fulfulde, Centrorienta Niĝero (Niĝero)

Fulfulde, Niĝeria (Niĝerio)

- 1.700.000 en Niĝerio (2000)

Orienta

Fulfulde, Adamava, `fub`

- 700.000 parolantoj en Kameruno (1993)
- 128.000 en Ĉado (1993)
- 90.000 en Sudano (1982)

Fulfulde, Bagirmi, `fui`

- 24000 parolantoj en Ĉado
- 156.000 parolantoj en Centrafrika Respubliko (1996).

Okcidentocentra

Fulfulde, Maasina, `ffm`

- 900.000 parolantoj en Malio (1991)
- 7000 parolantoj en Ganao (1991)

Fulfulde, Borgu, `fub`

- 280.000 parolantoj en Benino (2002)
- 48.000 parolantoj en Togolando (1993)
- parolata ankaŭ en Niĝerio

Pular

Oni donas ankaŭ alternativajn nomojn kiel *Futa Ĝalon* (kio estas fakte la nomo de la regiono kie ĝi estas parolata).

- 2.550.000 parolantoj en Gvineo (1991)
- 50.000 parolantoj en Malio (1991)
- 136.000 parolantoj en Senegalio (2002)
- 178.000 parolantoj en Sieraleono (1991)

Pular estas oficiala regiona lingvo en Gvineo, kaj multaj parolantoj estas unulingvaj. La lingvo prunteprenis multe el la araba kaj la franca, sed ankaŭ el la angla, portugala, malinka, susu, volofa kaj aliaj.

Okcidenta

Pulaar

Maŭritanio, Senegalio kaj Gambio

Skribado

Latina alfabeto

Por skribado estas uzata la latina alfabeto, sed la fulana uzas la jenajn aldonajn specialajn literojn por distingi signife diferencajn sonojn: Ɓ/ɓ, Ɗ/ɗ, Ŋ/ŋ, Ɲ/ɲ, Ƴ/ƴ (i.e. *imploda B, imploda D, velara N [sonoj kiel "ng" en la angla "king'], palatala N, ejektd Y*). La apostrofo ʼ estas uzata kiel gorĝa halto. En Niĝerio ʼy anstataŭas ƴ, kaj en Senegalio la litero ñ estas uzata anstataŭ ɲ.

fulana alfabeto

a, aa, b, mb, ɓ, c, d, nd, ɗ, e, ee, f, g, ng, h, i, ii, j, nj, k, l, m, n, ŋ, ny (or **ñ** or **ɲ**), **o, oo, p, r, s, t, u, uu, w, y, ƴ**

La literoj **q, x, z** estas uzataj en kelkaj kazoj por prunteprenitaj vortoj. En la pulana de Gvineo (*Pular*) estas aldona litero - **ɓ** - estas parto ankaŭ de la ortografio.

Araba skribado

La fulana estis skribita ankaŭ en la araba alfabeto aŭ *Ajami* ĝis la eŭropa koloniigo. Tio daŭras iagrade kaj ĉefe en kelkaj areoj kiel Gvineo.

Bibliografio

Arnott, David W. (1970). *The nominal and verbal systems of Fula*. Oxford: Clarendon Press.

Wilson, W. A. A. (1989). Atlantic. In John Bendor-Samuel (Ed.), *The Niger-Congo Languages*, pp. 81-104.

Notoj kaj referencoj

1. ↑ Rimarko : Estas diversaj nomoj uzataj por tiu ĉi lingvo, same kiel por la Fulaoj. Ili nomas sian lingvon **Pulaar** aŭ **Pular** en la okcidentaj dialektoj kaj **Fulfulde** (prononce kiel la angla esprimo *full-full-day*) en la centraj kaj orientaj dialektoj. ***Fula(h)*** kaj ***Fulani*** devenas origine el la Mandinga kaj la Haŭsa, respektive; ***Peul*** de la franca por la Volofa. Vidu ĉi tie (https://data.bnf.fr/fr/11940645/peul__langue_/) por pliaj nomoj kiun oni donas al tiu lingvo..
2. ↑ "...malgré son extension géographique et ses variations dialectales, le fulfulde reste une langue profondément unie." Ka, Fary. 1991. "Problématique de la standardisation linguistique: Le cas du pulaar/fulfulde." In N. Cyffer, ed., *Language Standardization in Africa*. Hamburg: Helmut Buske verlag. Pp. 35-38.

Eksteraj ligiloj

- esperante Informoj pri la Fulana lingvo (https://uea.org/vikio/kategorio:Fula_lingvo) en la vikio de UEA (https://uea.org/vikio/Ĉefpaĝo)
- http://www.pulaagu.com
- http://www.jamtan.com
- http://www.kawtal.org
- http://www.kawtal.com
- Miɗo Waawi Pular! Learner's guide to Pular (Fuuta Jallon) (http://www.ibamba.net/pular) de Herb Caudill kaj Ousmane Diallo
- Online learner's guide to Adamaoua Fulfulde (http://www.onigc.org/rpm/fulfulde/)
- Etnologa signifo de Fula (http://www.ethnologue.com/show_family.asp?subid=90740)
- Fulfulde Language Family Report (SIL) (http://www.sil.org/silesr/2003/silesr2003-009.htm) - ĝi inkludas mapon de dialektoj
- FULA (Fulfulde, Pulaar, Fulani, Peul) Lingvoretejo (http://www.isp.msu.edu/AfrLang/Fula_root.htm) el MSU's Webbook of African Language Resources (http://www.isp.msu.edu/AfrLang/hiermenu.html) (el 1980-aj jaroj)
- Pular Language Ebooks (http://www.aiys.org/aodl/public/access/alma_ebooks/index.php), PDF
- PanAfrican L10n retejo pri la fulana (http://www.panafril10n.org/wikidoc/pmwiki.php/PanAfrLoc/Fula)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Fulana_lingvo&oldid=6668149"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 21:14, 14 jul. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.